NOTE.—LIST HAS BEEN REDUCED OWING TO SUMMER VACATIONS AND SUMMER RECEIVING CONDITIONS.

Ĉar tiu ĉi numero de *International Language* atingos multajn personojn en ĉiu mondparto, kiuj ne estas regulaj legantoj, mi ripetos, riskante tedi, kelkajn el miaj pensoj esprimitaj en Oxford.

Denove mi deziras memori vin pri niaj ĝemeloj, Radio kaj Esperanto, kiuj ankoraŭ restas apartaj. Ambaŭ estas tute internaciaj kaj senlandlimaj. Unu bezonas la alian, do kial ili restu disigitaj?

Radio estas la plej grava komunikilo ĉi epoka. La ondoj en la etero iras tra la tuta mondo sen ia malhelpo krom difektetoj en la etero mem; la etero vibras ĉie, eĉ la korpo de la Esperantistoj mem estas vibrigataj de la radio-stacioj. Kial la Esperantistoj ne uzu la staciojn mem?

Ni devas esti tute praktikaj ĉe Radio; ni devas ĉiam subteni. La aŭtoritatuloj povas taksi la efikon de iu ajn dissendo nur per la poŝtricevo posta. Ni devas piki ilin tra la leterkesto. Tiu estas la sola vojo al la vundebla parto de la moŝta korpo. Vundadu! Niaj enlandaj aŭtoritatuloj diras tute aplombe, "La infana programo estas tre efika; la infanoj deziras

tion, kion ni aranĝas por ili, ĉar ni havas radio-rondon da 300,000 infanoj." Ciferoj parolas! Nombriĝu inter la Esperantistoj.

Nu, kara leganto, decidu jam nun, ke estonte vi estos daŭra subtenanto de la antaŭmikrofonaj laborantoj, por ke ili restu tie. Estas bona reklam-metodo, havigi antaŭ la okuloj de la publiko la nomon de la varo. Sonigu en la oreloj de la publiko la nomon de Esperanto. Subtenu enlande kaj eksterlande, precipe eksterlande. Esperanto estas tiom internacia, ke ni devas subteni niajn laborantojn internacie. La pruvo pri nia afero estas ĝia internacieco; poŝtkarto el eksterlando estas pruvo kaj estas multe pli efika ol enlanda poŝtkarto, kvankam ĉi tiu ankaŭ havas sian utilon.

Jen via devizo: aŭskultu kaj subtenu!

W.H.M.

The "Edinburgh" Esperanto Pocket Dictionary

Esperanto-English and English-Esperanto.

A Pocket Guide containing in Part I. no fewer than 5,000 Esperanto roots with at least one English meaning for each, and in Part II. about 13,000 English words with their Esperanto equivalents, together with a list of geographical names and a short table of personal names. Size 5½ in. by 2½ in. Every care has been taken to make it suitable for the needs of the student, and it will be found to follow closely the principles laid down in the *Fundamento de Esperanto*.

Limp Leather, 3s. 6d. net; Cloth, 1s. 6d. net.
Obtainable through any bookseller.

THOMAS NELSON AND SONS, LIMITED.

INTERNACIA KONGRESO OXFORD



Ekzemplerojn de la OFICIALA FOTOGRAFAĴO

farita en Christ Church
College oni sendos
afrankite por 3s. 9p.
nigra, aŭ 4s. 9p. bruna.

...

LONDON PANORAMIC COY.,
10 Farringdon Avenue, London, E.C.4
Anglujo.

CUNARD WINTER CRUISES

Jan. and Mar., 1931,

by the popular 20,000 ton cruising liner

"LACONIA."

WEST INDIES

from LIVERPOOL, Jan. 20th, AVONMOUTH,
Jan. 21st .. 43 days .. from 92 gns.

MEDITERRANEAN AND ATLANTIC ISLES

from SOUTHAMPTON, Mar. 7th
21 days from 42 gns.

MEDITERRANEAN

from SOUTHAMPTON, Mar. 31st
16 days from 32 gns.

*Apply Cunard Line, Liverpool, London,
or Local Agents.*

FOR YOUR CORRESPONDENCE USE PHOTOGRAPHIC POSTCARDS FROM YOUR OWN SNAPSHOTS !

They are much more interesting to your friends than ordinary picture postcards—and cost no more. We supply photographic postcards from your own negatives at 6 for 1/- post free, provided that orders are for not less than six cards at a time and not less than three from any negative.

NEGATIVES MAY BE OF ANY SIZE.

□

Send your order with P.O. direct to

The PARAMET Co., Ltd.
142 High Street, Walthamstow, E.17.

PRO HUNDO

DE R. J. YARWORTH.

Estimata sinjoro,

Hodiaŭ posttagmeze via hundo venis en mian ĝardenon kaj multe difektis la florbedojn. Ĉar mi amas la florojn kaj multe klopodas por kulturi ilin, mi petas vin uzi rimedojn por estonte teni la hundon for de mia proprejo.

Via fidele,
(fraŭlino) MARIO A—.

1.5.19—.

Estimata fraŭlino,

Mi multe bedaŭras, ke mia hundo faris difekton al viaj florbedoj. Jam mi ordonis, ke oni ne senĉenigu lin dum mia foresto. Tamen, se vi taksos la koston de rebonigo de viaj florbedoj, mi volonte kompensas vin.

Via fidele,
JOHANO B—.

2.5.19—.

Estimata sinjoro,

Mi dankas vin pro via letero kaj ankaŭ pro via propono pagi la koston de rebonigo de miaj florbedoj. Tion mi ne volas. Se vi tenos vian hundon for, mi estos kontenta.

Via fidele,
MARIO A—.

3.5.19—.

Estimata fraŭlino,

Estas nur juste, ke mi kompensu vin pro la difekto, kiun faris mia hundo, kaj mi insiste petas vin sendi al mi la kalkulon. Tamen, mi vizitos vin morgaŭ vespere por pardonpeti pri ĉio kaj diskuti la kompensaferon, se vi afable akceptos min.

Via fidele,
JOHANO B—.

4.5.19—.

Estimata fraŭlino A—,

Dum mia vizito hieraŭ vespere, vi parolis al mi pri via amo al muziko. Ĉar mi ankaŭ estas amanto de la muzikarto, mi petas, ke vi faru al mi la honoron akompani min al koncerto

6.5.19—.

en la urbdomo proksiman ĵaŭdon, por aŭdi sinjoron Segi List violonludi.

Via sincere,
JOHANO B—.

10.5.19.

Kara Mario,

Ĉu vi permesos, ke mi tiel vin nomu?

Mi estis tre, tre feliĉa dum la koncerto. Mi sentis, ke mi konas vin jam de jaroj! Sed koncerthalo ne estas loko por interparolado, kaj mi havis multon por diri al vi, kio estas ankoraŭ nedirita. Do ĉu vi partoprenos ekskurseton kun mi en la kamparon dimanĉon? Mi konas belan lokon, kie ni povos kaŝtrinki en florĉirkaŭita laŭbo.

Via,
JOHANO B—.

25.5.19—.

Mia karega Manjo,

Tio ĉi estas nur letereto por diri al vi, ke mi senpacience kalkulas la minutojn ĝis kiam mi vidos vian karan vizaĝon denove—ĝis kiam mi enbrake tenos vin, frustrante mian amon en viajn belajn oreletojn. Ŝajnas, ke tempo portas plumbajn ŝuojn!

Bonan nokton, mia dolĉa. Sonĝu pri mi.
Sole via,
Joĉjo.

15.6.19—.

Plej amata mia,

Estas mirinde pensi, ke post nur unu semajno vi estos mia eta edzino. Ĉu estas eble, ke tia granda, nemezurebla feliĉeco povos esti mia? Kaj nur pro mia hundo—benata besteto! Ĉiam mi dankos lin pro ke mi trovis vin, la plej belan, dolĉan, amindan.

Mi kisas vian portreton.

Joĉjo.

15.12.19—.

Estimata sinjoro Apotekisto,

Bonvolu sendi al mi botelon da veneno por mia damninda hundaĉo.

Via fidele,
JOHANO B—.

EL MIA OBSERVEJO

Mia observejo estas en Parizo, meze de la Latina Kvartalo, sur la Monto Saint-Genevieve, apud la Panteono, en kvara-etaĝa eta loĝejo. Mi ŝatas rigardi la stelojn, kaj la Luno mem estas amiko mia, sed la vera objekto de miaj observoj estas tute ne astronomia. Mi observas la homan Karakteron. Feliĉe, ke la situo de mia observejo permesas al mi fari variajn observojn. Parizo, kaleidoskopo, fokuso de internacia vivo, tranĉpunkto de tiom da karavanvojoj. . . . Al via sino venas gejunuloj de ĉiuj nacioj; viaj artistaj kvartaloj estas utero de nova, tutmonda arto; viaj universitatoj estas foiroj, kie oni vendas ĉiujn sciencojn por tiom malalta sumo kaj al neniu oni fermas la pordon! Parizo, via magneta radiado miksas la popolojn, kies reprezentantoj estas altirataj al vi kiel tineoj kaj insektoj, falantaj en flamon, vespere. En la sekvantaj linioj, mi prezentos al vi kelkajn el miaj observoj de karakteroj, kaj mi devas rimarkigi, ke la posedantoj de tiuj karakteroj ne falis en la krateron, sed post sukcesa vizito revenis hejmen, kun belaj rememoroj en siaj valizoj kaj kun firma decido en siaj kapoj: "ni revenos."

J.J.S. kaj K.R.C.S. estas nedisigeblaj amikoj. Unu devas amuzi la alian senfine, ĉar iliaj konvinkoj ja ne estas samaj. Tamen, ili havas komunan trajton: neelĉerpebla dezirego esti en Parizo, tiom kiom estas eble al ili. Kiam la libertempaj vagonaroj elverŝas siajn turistamasojn sur la kajojn, vi povas esti certa trovi unu aŭ la alian, ofte ambaŭ, tenante en la mano malgrandan valizeton, ĉar tiel vojaĝas angloj. Niaj amikoj ne meditas longe, sed elirante el la stacidomoj direktas siajn paŝojn decide al la Latina Kvartalo. Ili ja scias, ke ĝi estas la intelekta centro de Parizo kaj —parolante en esprimoj de Montparnasaj pentristoj: "umbiliko de la Universo." Neglektante la viziton al monumentoj, tombejoj kaj katakomboj, kiuj altiras la ŝafan amason de ordinara semajnfinoj, ili tuj komencas viziti kaj renkonti siajn Parizajn amikojn, pardonu, geamikojn. Tiuj du konantoj de moderna literaturo estas ankaŭ karakterstudentoj, kiel mi mem. Mi vidas antaŭ miaj spiritaĵoj okuloj la du amikojn, diskutantaj pri delikataj temoj de la vivo, eligantaj bluan fumon de blonda tabako apud fumanta kafo de Pariza kafejo. Kurioza influo de kafeino, nikotino kaj ciangazo al la homa menso. . . .

F. E. W. estas junulo, kies elparolo kaj sinteno tute ne malkaŝas lian naciecon. Tipo de moderna urba kaj intelekta laboranto, li kalkulas per admirinda malvarmsango la eblecojn de nia propagando en diversaj landoj kaj li estas spertulo pri horaroj (pro tio tre uzebla por esti edzo; virinoj ofte ne ŝatas konsulti horaron). Ĉu la eŭropanoj vivontaj en la Unuigitaj Statoj de Eŭropo similos tiun ĉi karakteron? Pardonu, sinjoro Briand, ni versajne ne vidos tion. . . .

Lastatempe eniris mian karakteralbumon nova fenomeno: L.N.N. Kun la supraj J.J.S. kaj K.R.C.S. li povus formi perfektan triunuon. Ankaŭ admiranto de Parizo. Li "lasis sian koron en Parizo." Dank' al lia amo al Parizo li fine tiom similas Parizanon (ĉu pro la ĉapelo en Parizo aĉetita?), ke Londona policano alparolis lin france, kiam li petis por informo en angla lingvo. Por esti honesta (mi pagas al mi tiun lukson), mi devas konfesi, ke tiu ĉi incidento ankoraŭ ne okazis en la realeco, sed, kiel kiris mia historio-profesoro en la gimnazio: "En la historio ni ne devas serĉi la verecon, sed la verŝajnecon; ĉu la faktoj vere okazis, tio ne gravas. Kontentigu per tio, ke ili estus povintaj okazi, konforme al la kondiĉoj!"

Venas amikoj kaj foriras, en ĉiujn partojn de la mondo. Mi ankaŭ baldaŭ foriros el Parizo. Mi venis al ĝi malriĉa kaj foriros el ĝi riĉa. Bedaŭrinde ne temas pri materia riĉeco, ĉar mi parolas simbolo. Tiu, kiu pasigas sufiĉe da tempo en Parizo kaj havas okulojn por vidi, orelojn por aŭdi, nepre pliriĉigos spirite. Tamen, post kelkaj jaroj da ĉeesto, oni komencas esti imuna, trosaturita, kaj oni vivas, meze de la arta metropolo, ne plu profitante el la altnivela spirita vivo, kiu fluas en ĝi. Pro tio estas, ke ni ĉiuj, adorantoj de Parizo, traktas ĝin kiel koketan amikino: ni forlasas ĝin, sopiras je ĝi, revenas al ĝi simile al migrantaj birdoj, kiuj portus en siaj bekoj pecetojn de intelektaj pajloj, kiujn ili faligas tie kaj tie ĉi, dum sia flugado. Tiu ĉi artikolo mia estas tia pajleto.

JOZEFO MAJOR (Parizo).

LINGVAJ DEMANDOJ

Sub tiu ĉi rubriko oni respondos al la demandoj de legantoj pri aferoj lingvaj, stilaj, k.t.p., havantaj ĝeneralan intereson. De tempo al tempo oni aludas al Lingvaj Respondoj (Plena Kolekto), de d-ro Zamenhof (havebla ĉe B.E.A., prezo: ordinara papero 1/6, pli bona papero 2/3); verko, kiun devus posedi ĉiu studento.

Akurate (Scivolo, Liverpool).—Kvankam la aludita verkinto estas tre konata samideano, li tute malprave uzis ĉi tiun vorton en la citita paragrafo. Bedaŭrinde tia ekzemplo povos trovi imitantojn. *Akurate* signifas angle *punctually, according to predetermined arrangements, prompt to date or to time*. *Akurata pago* ne signifas *correct payment* sed *punctual payment*; esprimo *kia akurata traduko* havas nenian signifon, krom se oni aludas al traduko farita je antaŭe difinita horo aŭ tago. Por la angla vorto *accurate* estas uzeblaj (laŭ cirkonstancoj) la vortoj *ĝusta, preciza, korekta, senerara*, kaj aliaj; sed neniam *akurata*. Sen la fundamenta signifo *punctual*, la vorto *akurata* ĉesas havi apartan utilon; kaj estas tre bedaŭrinde, ke kelkaj Esperantistoj ĝin misuzas.—B.L.

Fin(n)lando (N.L.J., Londono).—La literado de ĉi tiu nomo kun du *n* estas sufiĉe ofta, sed laŭ mia opinio tia formo estas tute kontraŭ la spirito de nia lingvo kaj neniel pravigebla. Fakte ĝi ne estas vere Esperanta formo; ĉar ĉiu litero en Esperanta vorto devas havi sian efikon en la prononco—alie la lingvo ne plu estas fonetika—kaj neniu, mi supozas, volus aparte prononci la unuajn du *n* en *Finnlando*. Eĉ en la vorto *finno*, ankaŭ uzata, prononco de du *n* estus tre ĝena. La sola pravigebla duobligo de konsonantoj en Esperanta vorto estas ĉe kunmetaĵoj kiaj *mal-lumo, ek-krio*, k.t.p. Se ĉe tiaj kunmetaĵoj (precipe en rapida parolo), oni ne tre klare prononcas la duoblajn literojn, tio ŝuldiĝas al natura malfacileco, kaj estas pardonebla; ĝi neniel pravigas enkondukon de duoblaj literoj en *radikojn*. Por ne disvastigi absurdan "escepton" al la admirinda reguleco de nia lingvo, konsilinde estas ĉiam skribi *Finlando*; kaj por la homo, *fino* aŭ *finlandano*. Neniam konfuziĝus *fino* en tiu senco kun *fino* en la ordinara senco. (Se iu deziras iom mallongigi la literon *i* en la unua vorto, li rajtas tion fari, pro tio ke la longeco de Esperanta vokalo ne estas ĉiam tute egala). Adjektive oni plej ofte povas uzi *finlanda*; ekz., *la finlanda parlamento*, kiu esprimo efektive estas tute logika—simile ni bone povus diri, ekz., *la franclanda* (aŭ *francuja*) *parlamento* anstataŭ *la franca*.—B.L.

IMPRESOJ DE LA DUDEK-DUA

Efektive, ano de la L.K.K. ne rajtas havi impresojn pri la Kongreso mem, nur pri ĝia organizo, kaj eble ankaŭ pri la akceptejo, li rajtas memori. Kaj tamen, kiel kelkaj aliaj, mi permesis al mi momentojn distrajn; kvankam pri s-ro Goldsmith kaj unu-du aliaj, mi vere dubas ĉu ili eĉ dormis. Oni disvastigis la famon, ke Goldsmith eĉ tranoktis en la Urbdomo kelkfoje, sed pri la vereco de tio rajtus paroli nur sinjorino Goldsmith.

La Kongreso certe havis tre gravajn rezultojn, kaj oni rajtas fanfaroni pri ĝia sukceso. Ekzemple, eble plej grave; centoj da alilanduloj konvinkiĝis, ke ne ĉiam ekzistas nebulo en Anglujo. Unu samideano, kiun mi gvidis en Londono, eĉ ŝajnis iom malkontenta, kiam li ne vidis nebulon, kaj kiam mi certigis lin, ke li certe ne havos okazon vidi tion,

krom se li restos en Londono ĝis novembro. Eĉ tiam ne certe.

Efektive, la vetero ne tre bone traktis nin dum la semajno de la Kongreso. Ĝi estis tia, kian ni nomas "aprila"—jen iomete da pluvo, jen sunbrileto; neniam ni havis tiujn daŭrajn sunbrilon kaj varmegon, kiujn ni ofte ricevas en aŭgusto. Tamen, oni ne plendis. Kiam oni devas multe kuri tien kaj reen, de unu kunveno al alia, de loĝejo al Akceptejo, kaj tiel plu, tia vetero estas eĉ taŭga. Eĉ dezirinda, kiam la Kongreso estas en granda urbo—kiom oni sopiris al iom da malsuno en Budapeŝt!

En Oxford estis malsimile. La urbo estas malgranda, kompare kun la grandaj ĉefurboj kutime elektitaj por niaj ĉiujaraj festoj. Urbo tre kvieta, malmulte da trafiko. Ankaŭ

LETERO DE LA PREZIDANTO

Al la Membroj ĉeestintaj la Kongreson.

KARAJ SAMIDEANOJ,

Nia bela Kongreso en Oxford nun pasis en la Historion. Tamen, feliĉe, ĝi ne nur vivos en niaj memoroj, sed havos—eĉ jam komencas havi—sian influon sur nian movadon; inter la publiko, pere de ni kaj la ĵurnaloj, kaj ĉe ni mem pro la nova inspiro kiun ni ricevis.

Por mi, kaj certe ankaŭ por ĉiuj membroj de la L.K.K., tiu neforgesebla semajno de bonhumoro kaj gajeco estis plena je plezuro. Ke ni povis efektivigi almenaŭ la plejparton de niaj projektoj, kaj ilin sukcesigi por la komuna ĝuo, estas afero al ni treege kontentiga. Ni devas bedaŭri nur la neeblecon, en tia granda kunveno, persone konatiĝi kun la plimulto; ankaŭ la neeblecon, pro manko de tempo aŭ libero, daŭrigi multajn komencitajn kaj tre interesajn interparolojn. Ĉiam tiel devas esti por la oficistoj de granda festo!

Certe en Oxford la Esperantistoj ne estis "tro enuigaj por si mem kaj la ekstera mondo"; la komuna gajeco, kaj la amuza flanko de la programo, ĉiam bone evidentiĝis. Guste pro tio, la malgajeco de la disiĝo moderiĝis per sento de plezuro pro pasinta kontento, kaj pro la nova pruvo ke nia lingvo taŭgas por ĉiaj celoj. Por multaj, feliĉe, restis la ĉarma Post-Kongreso en Londono; kaj ni ŝuldas tre koran dankon al la sindonaj membroj de la Londona Klubo, kiuj ĝin organizis.

Tamen ja ekzistas ankaŭ la "serioza" flanko de niaj Kongresoj; kaj estas bone, ke en Oxford la ĝeneralaj kaj fakaj kunvenoj, ankaŭ la prelegoj de la Somera Universitato, estis entute bone subtenataj. Ili havas grandan valoron propagandan.

Al mi kaj aliaj membroj de la L.K.K. estis diritaj kaj skribitaj multaj afablaj vortoj pri la aranĝoj; sed ni ja estis nur parto de la laborantaro. Mi do deziras, en la nomoj de ĉiuj Kongresanoj, ĉi tie publike kaj plej kore danki la multajn helpantojn, kiuj tiel efike kaj bonhumore deĵoris—ofte nevidate—dum la semajno. Ili, ankaŭ, tamen ja konstatis, ke partopreni la laboran flankon de Kongreso de gajaj samideanoj estas okupo ĝoja kaj inspira!

Kun plej koraj salutoj kaj bondeziroj,

BERNARD LONG.

ĉe la belaj kolegioj estas trankvile, ĉiuj studentoj estas for pro la ferio.

Tiom pli grandan efikon en la urbo mem havis nia kongreso. La vizito de mil ducent fremduloj ja faris sufiĉe grandan impreson. Fremduloj el aliaj landoj, kaj fremduloj el sovaĝaj regionoj: japanoj el Oriento, John Merchant kaj amikaro el Jorkŝiro! Ne ofte la urbo Oxford havas okazon bonvenigi tiom da bonvenaj gastoj!

Jam de la lundo antaŭ la komenco de la Kongreso s-ro Goldsmith kaj lia vigla helpantino f-ino Danks okupis la urbon, kaj de tiu tago jam la amikoj alvenadis. Jaŭdon, kiam alvenis Direktoro de I.C.K., s-ro Kreuz, oni sentis, ke vere la urbo komencas pleniĝi.

Fine en la sabato venis la amaso, tiu amaso, kiu vespere ĉe la akcepto de la Urbestro luktis tiel ĝentile por la kafo, la limonado, la kukoj kaj la glaciaĵoj. Ne kredu, ke mi volas akcenti nur tiun parton de la akcepto, tute ne; ankaŭ Lia Ĉefkonsilanta Moŝto de la urbo manpremis nin, same ankaŭ iu Ĉefkonsilanta Moŝtino. Tamen, ĉar ili donis al ni po nur unu manpremo, kaj po pluraj kukoj kaj glaciaĵoj, mi rajtas paroli unue pri tio, kio laŭ matematika kalkulo estas plej grava.

Lia Ĉefkonsilanta Moŝto bonvenigis nin per tre afablaj vortoj, eĉ li diris kelkajn vortojn en Esperanto. Mi devus ankaŭ raporti, ke iu belunifforma lakeo portis antaŭ li grandegan orumitan bastonon, la honor-insignon de la urbo; bedaŭrinde mi ne sukcesis

eltrovi tradukon por ĝia angla nomo, *mace*.


Dimanĉon matene okazis la diservoj. Por la Protestantoj predikis pastro T. Grahame Bailey. Estis imprese, aŭskulti la elokventan predikon de tiu blankhara sinjoro, kaj pensi, ke ankaŭ en tiu sama preĝejo, antaŭ multaj jarcentoj, la senmorta Erasmus predikis, en la internacia lingvo de sia epoko, la latina, kiun Esperanto hodiaŭ tiom taŭge anstataŭas.

Katolikaj amikoj raportis al mi, ke tre elokventa estis la prediko por ili de irlandano, pastro Gaffney.

Tagmeze okazis la fotografiĝo. Oni tre malbone aranĝis ĝin, ĉar en ĝi mi ne aperas. Mi ĉeestis, sed la aparato rifuzis atesti tion, kaj nebuligis min. Aliaj trovis, ke oni bone aranĝis la aferon.

La inaŭguracion oni tre solene malfermis. Tre ĝentila bonveno de la Kongresa Prezidanto, s-ro Bernard Long, kiun multaj tamen ne aŭskultis, pro tro granda admiro kaj atento al lia fraka beleco. Elokventeco de nia estimata prezidanto de I.C.K. Impresa deklamo de Julio Baghy. Salutparoloj de dek-du registaraj reprezentantoj, plejparte en Esperanto. Salutparoladoj de naciaj delegitoj. Rava tintetado de sonorilo, kiun lerte funkciigis amiko Kreuz.

Post la kunveno, enlitiĝo. Jes, bedaŭrinde, kiel en la hieraŭo, en la morgaŭo, kaj en ĉiuj vesperoj. Ho ve! karaj amikoj el eksterlando, kiom mi kunsentis vian doloron kiam vi trovis, ke post la deka oni ne povas aĉeti



LA AKCEPTEJO DUM LA KONGRESO

Foto de s-ro G. Wight



MEMBROJ DE LA 3A ĈE LA 22A

Foto de s-ro G. Wight

bieron, ke post la dek-unua neni restoracio estas malferma! Kiom mi ĝojetis, ke kelkaj el vi konsentis veni al tiu budo, kie la tutan nokton oni povis trinki kafon kaj manĝeti. Mi scias, ke la kafo estis aĉa, tamen, jen la sola loko en Oxford kie oni povas malfrue babili. Starante, jes, tiel ni devis resti, tamen ni bone amuzis nin kelkfoje, ĉu ne?

London oni komencis labori. Tio estas, tiuj, kiuj volis, kaj kelkaj, kiuj devis. Okazis Laborkunsidoj, fakaj kunvenoj en Kolegio Christ Church, kaj en la granda salono de la akceptejo, bonhumora profesoro Collinson malfermis la Sumeran Universitaton.

Vespere okazis Festo de Naciaj Dancoj. Tio tre plaĉis, dancoj anglaj, skotaj, irlandaj, kimraj, nederlandaj, hungaraj. Speciale plaĉis la lertaj infanetoj. La skota sakfajfisto revokis memorojn pri Edinburgo.

Mardon okazis multo memorinda. Pastro Ĉe demonstraciis sian metodon en halo plenplena, antaŭ ĉeestantaro entuziasma. Certe ankaŭ la britoj sentas la potencon ĉarmon de lia personeco!

La teatraĵon oni prezentis unuafoje. Mirinda sukceso, tiom pli ĝojiga, se oni konas la malfacilaĵojn kiuj montriĝis de la unua provo ĝis hodiaŭ mem. Aplaudego longa kaj sincera, precipe al la reĝisoro, Julio Baghy, sed ankaŭ al ĉiuj geludantoj, la sufloristino, la helpantoj.

Dum tri vesperoj oni prezentis ĝin, ĉar la halo povis enteni nur trionon de la kongresanoj. Por aliaj oni aranĝis koncerton en la Akceptejo. Internacia karaktero; dancis bela hungara fraŭlino Etta Szász kaj eta angla knabino Molly Brown, kantis pola samideano Sowinski kaj geangloj, s-ino B. F. S. Battison kaj s-ro Bannister, kies voĉoj tre plaĉis. Entute koncerto, kiu pruvis multan talenton ĉe la artistoj. Anoncojn faris prezidanto Long, denove oni aprezis lian frakan belecon.

Jaŭdon la plejmultaj kongresanoj vojaĝis for el Oxford, por ekkapti iom el la spirito de aliaj regionoj anglaj. Al Windsor, al Stratford, al Gloucester kaj al Stonehenge. Oni bone vojaĝis, bone observis, kaj revenis laca, tamen feliĉa. Oni devis efektive elvoki en si ioman energion, ĉar jam alproksimiĝas la tempo, kiam necesas alproksimiĝi la dommastrinojn.

Dum tuta semajno oni avertis nin, en la esperantlingva fakto de la ĉiutaga ĵurnalo, *Oxford Mail*, per anoncoj sur la tabulo en la akceptejo, per buŝaj admonoj, privataj kaj publikaj. Oni diris al ni, ke almenaŭ unu nokton ni pretendos je libereco el nia sklaviĝo, ni ne plu submetos nin al angla moraro, ni balos ĝis la unua matene.

Kaj finfine ni venkis! Nu, preskaŭ venkis; efektive, pro iu miskompreno oni ludis nian himnon tro frue je kvaronhoro! Tamen, mi kredas, ke la dommastrinoj ne aŭdis pri tio,



Foto de s-ino M. C. Merrick

KELKAJ EL LA BLINDAJ KONGRESANOJ

ke ili kredis sin plene venkitaj, doninte permeson reveni . . . nu, je la horo de reveno. Tiun nokton ĝi multe variis. Unu sinjoro . . . tamen mi ne komencu tiel rakonti, certe mi neniam finiĝus.

Jes, mi kredas, ke la Kongresa Balo plaĉis. Precipe nia angla danco "Paul Jones" plaĉis,

akceptejon, kie ni tiel ofte kaj feliĉe babiladis, devis forvojaĝi el la bela universitata urbo Oxford. Multaj el ni povis ankoraŭ rigardi al feliĉaj tagoj en Esperantujo, ĉar la Londona Esperanto-Klubo preparis por ni tre allogan programon por semajnfina Post-Kongreso. Ili luis halon Conway, lumplena kaj bela konstruaĵo, kiu ŝajnis speguli la spiriton de tiuj gajaj tagoj. Ekskursoj, koncertoj, teatraĵo, publika propaganda parolado en parko Hyde, el multa regalo oni povis elekti. Oni elektis, kaj feliĉis.

Entute, tagoj tre feliĉaj por ni britoj, kiuj havis la okazon bonvenigi tiom da alilandaj amikoj. Laŭ amikoj miaj el fremdlando, kies sincerecon mi ne rajtas dubi, feliĉaj tagoj ankaŭ por ili.

Jes, spite la mornecon de Oxford post la dudek-tria horo, ni diru denove—Feliĉaj Tagoj! Kaj ĉiuokaze, en Londono oni havas, krom mateno kaj posttagmezo, ankaŭ noktojn. Ĉu ne?!

K. R. C. STURMER.




Foto de s-ro G. Wight

LA ĈEFA INDUSTRIO EN OXFORD DUM LA KONGRESO: AŬTOGRAFAĖO !

kiam ŝajnis, ke ĉiuminute oni havas novan kundancant(in)on! Multaj kostumoj estis tre belaj, la orĥestro bone ludis, delikate kaj nuance oni lumigis, kaj la granda halo lasis sufiĉan spacon por partoprenantoj kaj rigardantoj.

Venis la fino de la danco en la sabata mateno, je la unua horo. Pli poste venis evento malpli gaja, la ferma kunveno. Kaj tiam oni devis adiaŭi amikojn, devis forlasi lastfoje tiun

Ĉu vi legis

"INTERNATIONAL LANGUAGE"

kun plezuro?

SE JES

Sendu tri svisajn frankojn al "International Language," 142 High Holborn, London, W.C.1.,

**LEGU LA GAZETON
DUM PLUA JARO!**



LISTO DE KONGRESANOJ

1098. Turner, C., Basildon, Greenfield Estate, Little Sutton, Wirral, Anglujo.
1099. de Kuiper, E., Albrecht Beylinggracht 38, Schoonhoven, Nederlando.
1100. Strauch, A., Helenenstrasse No. 12/14, Bottrop, Vestfalia, Germanujo.
1101. Plowman, G. A., 18 Adelaide Street, Northampton, Anglujo.
1102. Faes, s-ino L., Lange Herenthalschestraat 100, Antwerpen, Belgujo.
1103. Faes, A., Lange Herenthalschestraat 100, Antwerpen, Belgujo.
1104. Heilker, P., Kruisweg 1081, Hoofddorp, Nederlando.
1105. Rusling, f-ino G. M., Singel 16a, Bussum, Nederlando.
1106. Beck, f-ino A. M. E., Singel 16a, Bussum, Nederlando.
1107. Nort, f-ino H. de, Singel 16a, Bussum, Nederlando.
1108. Foster, f-ino A., 12 Laverick Terrace, Annfield Plain, Co. Durham, Anglujo.
1109. Forslund, H., Aspekullen 5, Uddevalla, Svedujo.
1110. Riley, f-ino M., School House, Clifton-cum-Norwood, Birstwith, Harrogate, Anglujo.
1111. Wilkinson, f-ino D., 40 Springwood Terrace, Bradford, Anglujo.
1112. Goldsmith, f-ino E., 33 Crowlands Avenue, Romford, Anglujo.
1113. East, R., 20 Highfield Avenue, Headington, Oxford, Anglujo.
1114. Pfeiffer, F., Königstrasse 57, Halle-Saale, Sachseu, Prusujo.
1115. Pfeiffer, H., Königstrasse 57, Halle-Salle, Sachseu, Prusujo.
1116. Segers, s-ino F., Bvd. Ad. Max. 14, Bruxelles, Belgujo.
1117. Wannek, s-ino A., 31 Weissenwolffstr. Linz a/Donu, Aŭstrujo.
1118. Scott, R., Wilbury Crest, Letchworth, Herts., Anglujo.
1119. Petzold, A., Scharnhorststr. 43. I, Leipzig, Germanujo.
1120. Barton, A., 46 Stannington Road, Sheffield, Anglujo.
1121. Facchi, G., Corso Vittorio Emanuele 64, Brescia, Italujo.
1122. Andrews, s-ino M., National Institute Home for the Blind, Quarry Hill, St. Leonards-on-Sea, Anglujo.
1123. Hoffmann, T., Dolny Val No. 212, Ziliua, Ĉeĥoslovakujo.
1124. Mannoury, f-ino S. D., Amstelveensche weg 56, Amsterdam (W), Nederlando.
1125. Adamkoua, f-ino M., Waterschei 523, Limbourg, Belgujo.
1126. Björkstrand, Kaptensgatan 9, Sundsvall, Medelpad, Svedujo.
1127. Phillips, s-ino F. J., 348 Westborough Road, Westcliff-on-Sea, Anglujo.
1128. v.d. Helder, s-ino J., Kerklaan 9, Gelderland, Nederlando.
1129. Suchalski, f-ino T., 2 maja ul 15, Wejherowo, Pomorje, Danzig.
1130. Herford, f-ino A. C., 47 Parsonage Road, Withington, Manchester, Anglujo.
1131. Fidelovuer, f-ino R., Str. Wajevidika 38, Katowice, Polujo.
1132. Kranendonk, f-ino L. H., Spinweg 120, Dordrecht, Nederlando.
1133. Epstein, s-ino E., 195 Eilbeckerweg, Hamburg, Germanujo.
1134. Epstein, F., 195 Eilbeckerweg, Hamburg, Germanujo.
1135. Johansson, s-ino M., Centralgatan 16, Nynäshamn, Svedujo.
1136. Haraldson-Hagberg, s-ino L., Fredsgatan 3, Nynäshamn, Svedujo.
1137. Greaves, V., 9 Chamberlain Avenue, Stoke-on-Trent, Anglujo.
1138. Edelenbosch, S. R. J., Kade 401, Enkhuisen, Nederlando.
1139. Morrissey, S., 52 Michael Street, New Ross, Irlando.
1140. Cousins, J., 4 William Street, New Ross, Irlando.
1141. Appleby, s-ino H. K., 32 Clarence Street, Cheltenham, Anglujo.
1142. Hamand, f-ino J., Schaller, Iowa, Usono.
1143. Brown, s-ino K., 19 Beulah Hill, S.E. 19, London, Anglujo.
1144. Brown, f-ino M., 19 Beulah Hill, S.E.19, London, Anglujo.
1145. Rozencwajg, M., Stelecka 17, Bedzin, Polujo.
1146. Turner, R. E., 1 Brampton Road, Hampden Park, nr. Eastbourne, Anglujo.
1147. Beima, M., Stuartstraat 18, Alkmaar, Nederlando.
1148. Bernard, f-ino E., Vreewijkstr. 27, Leiden, Nederlando.
1149. Horaiek, A., Sv. Tanske námisti 521, Hora Kutna, Ĉeĥoslovakujo.
1150. Halma, T., Klingelbeeksche weg 61, Arnhem, Nederlando.
1151. Potts, s-ino A. M., 82 Priory Way, N. Harrow, Anglujo.
1152. Hurley, f-ino A., 38 Hilary Street, Burnley, Anglujo.
1153. Battye, A. E., 122 Castle Street, Grimsby, Anglujo.
1154. Seitaro, S., Premier House, 28 Uneda, Osaka, Japanujo.
1155. Phillips, f-ino A., 97 Fernhead Road, Maida Hill, London W, Anglujo.
1156. Bruch, J. W., Westendstrasse 6, St. Ingbert, Saar-Teritorio.
1157. Zöphel, f-ino M., Lehrerin (aus Leipzig), Lehrerinnenheim, Norderney, Germanujo.
1158. Roberts, s-ino H., Vernon, Saxon Road, Ramsgate, Anglujo.
1159. Yarworth, R. J., 18 First Avenue, Grimsby, Anglujo.
1160. Norris, A. W., 32 Doddington Road, Wellingborough, Anglujo.
1161. Couto Fernandes, A., Laranjeiras 227, Rio de Janeiro, Brazilo.
1162. Vogt, A., Calwerstrasse 54, Stuttgart, Germanujo.
1163. Wainwright, f-ino H. M., 18 Kenilworth Road, St. Leonards-on-Sea, Anglujo.
1164. Pitlik, A., Kremencova 17, Praha II, Ĉeĥoslovakujo.
1165. Tiard, C., Rue du Faubourg St. Denis 209, Paris X, Francujo.

1166. George, J., rue Fontaine-au-Roi 30, Paris XI, Francujo.
 1167. Lambert, f-ino M., 8 Rue Table Ronde, Vienne, Ysère, Francujo.
 1168. Bugge-Paulsen, R. E., Odinsgate 1, Oslo, Norvegujo.
 1169. Sletter, O. B., Bygd Alle 63, Oslo, Norvegujo.
 1170. Sletter, s-ino A., Bygd Alle 63, Oslo, Norvegujo.
 1171. Bertie, f-ino G. A., 385 Woodstock Road, Oxford, Anglujo.
 1172. Bertie, d-ro L. W. H., 385 Woodstock Road, Oxford, Anglujo.
 1173. Minchin, W., 29 Westgate Street, Gloucester, Anglujo.
 1174. Kennion, T. A., The Maples, Hoddesdon, Herts., Anglujo.
 1175. Langner, E., Sprottau, Slesio, Prusujo.
 1176. Southcombe, H. W., 5 Crescent Road, Kingston, Anglujo.
 1177. de Lang, S., Assendorperdijk 26, Znolle, Nederlando.
 1178. Deans, f-ino E. D., 220 Bruntsfield Place, Edinburgh, Skotlando.
 1179. Darnell, H., 24 Woodhouse Avenue, Fartown, Huddersfield, Anglujo.
 1180. Dixon, s-ino L. L., 12 Norham Gardens, Oxford, Anglujo.
 1181. Dixon, W. H., 12 Norham Gardens, Oxford, Anglujo.
 1182. Gregg, J. R., 45 Grameray Park, New York, Usono.
 1183. Thompson, G., Waterside-Derry, Londonderry, Irlando.
 1184. Christensen, P. P., 174 W. Washington Street, Chicago, Usono.
 1185. McCallum, R. B., Pembroke College, Oxford, Anglujo.
 1186. Newton, J. W., 5 Firs Avenue, N.10, London, Anglujo.
 1187. Hodakowski, T., Jabtonowskich 10/12, Krakow, Polujo.
 1188. Österberg, E., Harnosand, Svedujo.
 1189. Gilles, R., 130 Avenue Parmentier, Paris, Francujo.
 1190. Knez, T., Gosposvetskoi 1, Ljubljana, Jugoslavujo.
 1191. Ridpeth, s-ino A., 34 Ecclesbourne Gardens, N.13, London, Anglujo.
 1192. Olšovanger, I., 75 Gt. Russell Street, W.C.1, London, Anglujo.
 1193. Friedbeim, s-ino M., 66 Sybelstr., Berlin, Germanujo.
 1194. Cronquist, f-ino A. A., Mollegrand 13, Halsingboug, Svedujo.
 1195. Rocamora, D., Sayetana 13, Bcelona, Hispanujo.
 1196. Oakland, f-ino B., 40 Woodhouse Road, Mansfield, Anglujo.
 1197. Pino, A., Strato Colon 24, Valencia, Hispanujo.
 1198. Fricke, W., Hildesheimerstr. 226/I, Hannover, Germanujo.
 1199. Tredgold, f-ino M., Eversleigh Court Hotel, 109 Cromwell Road, London W., Anglujo.
 1200. Djoudjeff, S., 6bis rue d'Italie, Paris, Francujo.
 1201. Bourdillon, s-ino M. D., The Oaks, Headington, Oxford, Anglujo.
 1202. Bourdillon, f-ino D. M., The Oaks, Headington, Oxford, Anglujo.
 1203. Lampen, f-ino H., Helsinki, Finnlando.
 1204. Reichenbach, s-ino F., Hieschlochufer 22, Erfurt, Germanujo.
 1205. Carter, W., Millstone Lane, Nantwich, Ches., Anglujo.

1206. Dennis, G., 150 George Borrow Road, Norwich, Anglujo.
 1207. Green, J., New Lane Terrace, Farnley Tyas, Huddersfield, Anglujo.
 1208. Hay, A., Breck Road, Wallasey, Anglujo.
 1209. Gregor, D., 11 Sketty Road, Swansea, Kimrujo.
 1210. Culver, f-ino J., Case Stand, Geneva, Svisujo.
 1211. Esperanto Association of California, Usono.

LAŬLANDA STATISTIKO DE LA ALIĜINTOJ

Anglujo, 623; Aŭstralio, 6; Aŭstrujo, 7; Belgujo, 23; Brazilo, 2; Bulgarujo, 2; Ĉeĥoslovakujo, 13; Danlando, 4; Danzig, 4; Finnlando, 4; Francujo, 48; Germanujo, 142; Hispanujo, 7; Hungarujo, 18; Irlando, 9; Islando, 1; Italujo, 8; Japanujo, 9; Jugoslavujo, 7; Kimrujo, 7; Nederlando, 75; Norvegujo, 5; Polujo, 36; Saar-Teritorio, 3; Rusujo, 1; Skotlando, 106; Svedujo, 23; Svisujo, 7; Usono, 11. **Entute, 1211 el 29 landoj.**

C. C. GOLDSMITH,
Sekretario.

SMALL ANNOUNCEMENTS

(1d. per word. Minimum 1/- per issue. Prepaid)

Copy must be received at our offices by the 8th of the month for insertion in the next issue.

Bournemouth—Food Reform Guest House, "Lough-tonhurst," Westcliff Gardens. Best Situation, Gas Fires, Good Centre. Terms moderate. Apply Manager.

The Standard English-Esperanto Dictionary for students and users of Esperanto is "Fulcher & Long." It gives Esperanto translations of thirty thousand English words, and shows the constituent parts of compound Esperanto forms. Cloth bound, 350 pp. Published by E. Marlborough & Co., Ltd. Obtainable through any bookseller, or from the office of *International Language*, price 7/6 (by post 8/-).

Trimnells' Nervine Tonic for weakness and nervous debility, from any cause, for old and young, 3/2 post free. 64-page book about Herbs, 2d. post free. Est. over 50 years. Trimnells, The Herbalists, Nature Cure and Diet Specialists, 144 Richmond Road, Cardiff.

Joseph Rhodes kaj La Fruaj Tagoj de Esperanto en Anglujo. Verkita de John Merchant, Prezidanto de Brita Esperantista Asocio, tradukita Esperanten de f-ino L. Briggs. Stilo perfekta; bone kaj bele presita. Prezo: unu ŝilingo kaj 9 pencoj (afranko 2p.) ĉe W. H. Hirst, 18 Byram Street, Huddersfield.

Priscilla.—152 High Holborn (first floor). Near B.E.A. Special 3-course luncheon, 1/3. Good cuisine. Quick service.

Bahai Reading Room, 288 Upper Regent Street. Open daily 1 to 6 except Saturdays and Sundays. Meetings, Wednesdays, 8 p.m.

Esperanto Typewriter.—Esperantists should buy the British-made "Regent" Portable Typewriter with special Esperanto accents. The finest Portable on the market. £14 14s. Secretary, P.S. Bureau, 59 Poplar Road, S.W.19.

Latest Novelty.—Every Esperantist should possess the "Europe Wheel." Gives geographical details, etc., of every country at a single turn. 1/6 post free. BM/DSNG, London.

Duplicating—Typewriting. English and Esperanto. For Groups or individuals. Miss Kathleen Clamp, F.B.E.A., 1 Barter Street, Hart Street, London, W.C.1.

Shopkeepers.—Agents wanted for 1d. Pills "Head and Nerve" and "Tooth and Nerve" Powders. They sell well and always give satisfaction. Trimnells, The Herbalists, Nature Cure and Diet Specialists, 144 Richmond Road, Cardiff. Est. over 50 years.

THE ESPERANTO STUDENT

Editor—Redaktoro: W. SEVERN.

(This section is also published separately for use in Schools, Classes, etc. Applications for particulars of special terms should be made to the Publishers of this Magazine.)

AN INDEX TO ESPERANTO

PRONUNCIATION

VOWELS—*a, e, i, o, u*, pronounced *ah, eh, ee, oh, oo* without any diphthongal sound but as nearly as possible with the pure sounds heard in (e.g.) Italian. Approximate English equivalents are found in: *are there three or two*.

CONSONANTS—*b, d, f, h, k, l, m, n, p, r, t, v, z*, as in English; *g* as in *good*, *ĝ* as in *gem*, *c* like *ts* in *mats*, *ĉ* like *ch* in *church*, *s* as in *soon*, *ŝ* like *sh* in *shell*, *j* like *y* in *yes*, *ĵ* like *si* in *vision*, *h* like Scottish *ch* in *loch* (seldom met with).

ŭ resembles the English consonantal *w* and is used to form the diphthongal combinations *aŭ* (like *ow* in *coward*) and *eŭ* (like *a(y)w* in *wayward*). The combinations *aj* and *oj* are like *y* in *my* and *oy* in *boy*, *ej* like *ay* in *saying* and *uj* as in *Hallelujah*.

r must (like all other letters) *always* be fully pronounced, i.e., rolled; thus, *arbo* is not to be pronounced *ahbo*, but *ahrrbo*.

Every letter has fundamentally its alphabetical sound, but in fluent and natural speech the vowels are frequently somewhat shortened (thus the Esperanto *jes* is pronounced like *yes* in English).

In every word of two or more syllables a strong emphasis (or "tonic accent") must be given to the last syllable but one, thus: *patro, patrino, patrineco; luma, malluma, mallumega*.

GRAMMAR

(Word-endings)

NOUN	ADVERB	ADJECTIVE
O	E	A
plural J		N accusative
U	VERB	US
imperative	I	conditional
IS	AS	OS
past	present	future
PARTICIPLES		
ACTIVE -INT-	-ANT-	-ONT-
PASSIVE -IT-	-AT-	-OT-
	past	present
		future

LA MUSOJ KAJ LA KATO

The Mice and the Cat

FABLO DE EZOPO

(A) fable of Aesop

Iam kelkaj musoj loĝis en domo en kiu ankaŭ loĝis granda kato.
Once (upon a time) some mice dwelt in (a) house in which also dwelt (a) big cat.
 Eĉ en la plej mallumaj noktoj ili ne kuraĝis iri el la truoj ĉar la kato
Even in the most dark nights they (did) not dare to go out of the holes because the cat
ĉiam estis preta por kapti kaj manĝi ilin. La musoj do fariĝis tre maldikaj kaj
always was ready for to catch and eat them. The mice therefore became very thin and
malsataj. Unu tagon ili kunvenis kaj priparolis la situacion. "Mi proponas," diris
hungry. One day they met together and discussed the situation. "I propose," said
juna muso, "ke la kato portu kolumon kaj sonorileton. Tiukaze ni aŭdos kiam ĝi
(a) young mouse, "that the cat carry (a) collar and little bell. In that case we shall hear when it
alproksimiĝos." Ĉiuj laŭte aklamis la proponon ĝis unu maljuna muso demandis, "Sed
approaches." All loudly acclaimed the proposal until one old mouse asked, "But
kiu alfiksis la sonorileton?"
who (will) affix the little bell?"

TIO, KIO ŜAJNAS FACILA, NE ĈIAM ESTAS FAREBLA.

That, which seems easy, not always is practicable.

Dentisto: "La dentoj en ĉi tiu vitra ŝranko estas ĉiuj eltiritaj el la buŝoj de literaturistoj."

Vizitanto: "Ho! Ha! eltiraĵoj el popularaj verkistoj, ĉu ne?"

Maljunulo (al knabeto kiu ploras): "Ĉu vi estas en doloro?"

Knabeto: "Ne, sinjoro, la doloro estas en mi."

Eltiraĵo el knaba verketo pri ŝapo: — "Ŝapo bonodoras sed malbonĝustas. Ĝi pli malbonĝustas kiam ĝi eniras la okulojn."

Kuracisto (al vundita oficiro): "Kiel vi sentas kiam vi mortigas homon?"

Vundita oficiro: "Ho, tre bone, kaj vi?"

SAGACA ĈEVALO

Iu homo, loĝanta en Missouri, devis vojaĝi al Nebraska, por vidi bienon. Li vojaĝis, rajdante sur ĉevalo, kiun li mem dresis kaj kiu alvenis ĉe lia fajfo, kvazaŭ hundo.

Veninte al Nebraska, li vojaĝis tra iu loko, kie estis du vojoj. Unu sekvis riveron, kaj la alia leviĝis super monton.

La homo vidis, ke la trafiko pasas super la monton, sed li decidis uzi la apudriveran vojon. Li ne sciis, ke sur ĝi troviĝas mov-sablaĵoj, kaj ke oni ne povas uzi ĝin en la printempo kaj somero. Troviĝis apud ĝi kutime vojsigna tabulo, por averti la fremdulojn pri la danĝero, sed iu prenis ĝin for.

La homo saltis de la ĉevalo kaj lasis ĝin paŝtiĝi sur herbejo, kaj mem iris laŭlonge de la vojo, ĝis li tiom malproksimiĝis de la ĉevalo, ke li decidis sidiĝi kaj atendi ĝin.

Subite li trovis, ke li estas sur mov-sablaĵo. Liaj piedoj eniĝis en la sablon, kaj li ne povis eltiri ilin. Li ekfajfis al la ĉevalo, kaj kriis por helpo, sed neniun venis al li.

Li aŭdis junulojn, kiuj kantis ie sur la rivero, sed ili ne povis aŭdi lin.

La terura sablo ensuĉis lin preskaŭ ĝis la talio, kaj li pensis, ke li jam estas perdota.

En tiu momento alkuris la ĉevalo kaj stariĝis apud sia mastro. La homo estis en tro malalta situacio por kapti la piedrington aŭ bridon, tial li kaptis la voston de la ĉevalo, kaj ordonis, ke ĝi tiru lin.

La ĉevalo faris tre fortan tiron kaj altiris la mastron al sendanĝera loko.

El Bela Joe, aĉetebla ĉe la B.E.A., 3s. 10p.

Sinjinorino (al bakisto): "La kuko, kiun vi sendis al mi estas tro malgranda. Mi povus enmeti la tuton en mian buŝon."

Bakisto: "Sendube, sinjinorino, sed ne decas kulpigi la kukon."

NE BUKEDO

La instruistino ofte admonis Johanon pro lia malpureco.

Unu posttagmezon, li tiom malbonodoris, ke ŝi sendis leteron al lia patrino, plendante pri lia ofta malpura stato kaj abomenaodoro.

La sekvantan matenon, Johano transdonis al la instruistino malpuregan ĉifitan fragmenton da papero sur kiu troviĝis la vortoj, "Mia Johano tute ne estas bukado; vi lernigu, ne flaru, lin."

Competitions for Boys and Girls

This competition is limited to boys and girls of not more than 15 years of age. Competitors must write their solutions on a postcard addressed "KONKURSO," c/o B.E.A., 142 High Holborn, London, W.C.1, and add their age and the name of their School. Two Monthly Prizes will be given, and at the end of the series special prizes will be awarded to those who obtain the highest number of marks.

N.B.—It must be understood that solutions are the competitors' unaided work.

In schools where Esperanto is taught solutions may be written on papers (postcard size) and sent in one envelope, to save postage.

Competitors may enter Competition A or B, or both. Entries to be sent not later than the 18th Oct., 1930.

COMPETITION—No. 1.

A.

PARTOJ DE LA KORPO

Find the names (roots only) of parts of the body hidden in the following sentences. (Example: La ventomontro ilo norDEN Turniĝis):—

1. Malgaja funebra kanto eksonis trans la valo.
2. En la sama momento ni pafis kaj mortigis la furiozan beston.
3. En ĉiu malluma nokto mi pensas pri tiu fosaĵo.
4. La gvidisto parolos tre mallaŭte, do vi devos atente aŭskulti.
5. Kun mia malnova amiko li sidis sur la verando kaj interparolis.
6. La aliaj knaboj forte ridis kaj montris al ili per la fingroj.
8. La proksiman tagon la ŝipo eniris tre belan golfeton.
8. La patrina zono savis al ili la vivon.
9. Ŝi baldaŭ pretiĝis por eliri el la domo.
10. Post kiam ŝi estis ordiginta lian ĉambron ĝi restis ŝlosita ĝis li revenis el la lernejo.

(Give the English meanings also.)

B.

VERKETO

Write in Esperanto an autobiography of a rabbit. (Not more than 100 words.)

Iun malhelan tagon knabo promenis sur la strato tenante super la kapo malfermitan ombrelon.

"Ne pluvas," diris afabla maljuna sinjoro.

"Ne, sinjoro," respondis la knabo.

"Kaj la suno ne brilas."

"Ne, sinjoro."

"Do, kial vi tenas la ombrelon super la kapo?"

"Ĉar, kiam pluvas, la patro bezonas ĝin, kaj kiam la suno brilas, la patrino deziras ĝin; tial mi povas uzi ĝin, nur en tia vetero, kian ni hodiaŭ havas."



WINTER IS COMING

AND THE LONG DARK NIGHTS WILL
SOON BE HERE.

UTILISE THEM PROFITABLY

BY ENROLLING NOW FOR ONE OF THE

"Standard" Correspondence Courses

IN ESPERANTO.

Preliminary — Advanced — Translation
—the new **Literary Service** (your own
efforts corrected by experts).

*Prospectus of any Course
post free on request.*



BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION,
142, HIGH HOLBORN, LONDON, W.C.1.

THE HOLIDAY FELLOWSHIP

seeks to facilitate

INTERNATIONAL UNDERSTANDING
AND GOODWILL

by arranging

SOCIAL HOLIDAYS

in many of the most beautiful parts of
Britain and the Continent where guests of

ALL RACES, RELIGIONS
AND POLITICAL CREEDS


can meet on a common ground.

Charges from 35/- a week.

*Send for particulars of Autumn Holidays
to—*

The Holiday Fellowship Ltd. (Dept. E.)
"Highfield" Golders Green Rd., London, N.W.11

LA INTERNACIA FUMAJO!



Cigaredo Esperanto

(THE ESPERANTO CIGARETTE)

*These cigarettes are warranted hand-
made from a blend of the purest
Virginian Tobaccos, and every
precaution is exercised in their pre-
paration to ensure a uniform and
high-grade article.*

Price, per packet of 20, 1/6 post free.
for 10 packets, 14/- „ „

OBTAINABLE FROM THE B.E.A.

SOLE PROPRIETORS:
BUCHANAN, SCOTT & Co.
Glasgow.

(WHOLESALE ONLY).

ESPERANTO CHOCOLATES

Specially
Prepared
by

CADBURY

Bournville

May be obtained from your local
Confectioner in 1 lb. and $\frac{1}{2}$ lb. boxes

AN ESPERANTO LIBRARY

It should be the ambition of every keen Esperantist to have at least a small selection of the best publications for reading and reference.

The following list contains a selection of some suitable books for such a small library. If desired, you may choose books value 25/- to 30/-, and then pay for them at the rate of 4/- or 5/- monthly. In that case, let us have a list of those you would like, and we will make out, and send to you, an appropriate order form.

		s.	d.
BIBLIOGRAFIO DE INTERNACIA LINGVO.	P. E. Stojan ..	paper	10 0
DANCU MARIONETOJ.	J. Baghy ..	half-cloth 3/-; cloth	4 6
DU MAJSTRO-NOVELOJ.	T. Storm (H. Heitmuller) ..	„	4 3
ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY.	Fulcher & Long ..	„	7 6
EN OKCIDENTO NENIO NOVA.	E. M. Remarque (Kvar) ..	„	7 0
ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY.	E. A. Millidge ..	„	7 6
FERA KALKANUMO, LA.	Jack London (G. Saville) ..	paper	2 9
FUNDAMENTA KRESTOMATIO.	L. L. Zamenhof ..	cloth	5 0
IMPERIESTRO KAJ GALILEANO.	Ibsen (Bulthuis) ..	„	8 0
KOMPLETA GRAMATIKO KAJ VORTFARADO.	Fructier ..	„	5 9
LUNO DE IZRAEL.	Sir H. R. Haggard (Butler & Payson) ..	„	5 0
ORIGINALA VERKARO.	Dr. L. L. Zamenhof ..	„	15 0
PINOKJO.	C. Collodi (M. Márcesi) ..	„	5 0
PLENA VORTARO DE ESPERANTO		„	10 0
POR RECENZO.	K. R. C. Sturmer ..	„	2 6
PRI LA ORIGINO DE L'HOMO.	Sir A. Keith ..	„	2 6

POSTAGE EXTRA.

BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (Inc.)

142, HIGH HOLBORN, LONDON, W.C.1.

